GRAVA EKSPERIMENTO ĈE RADIO ROMA.

Laŭ iniciato de „Scienca Revuo", en la Esperanta dissendo de la 6a de Junio, ĉe Radio Roma, okazos grava fonetika eksperimento por esplori la distingeblecon de diversaj sonoj (precipe de konsonantoj esperantaj kaj de kelkaj kombinaĵoj de konsonantoj).

Tiucele estos diktataj 150 prov-silaboj; ĉiu silabo estos diktata dufoje (per vira kaj per virina voĉoj).

Ĉiu aŭskultanto skribu, per esperantaj literoj, la kaptitajn silabojn tiel kiel oni aŭdis (aŭ kredis aŭdi) ilin; ĉiukaze nepre skribu ion.

Bonvolu sendi la diktaĵon al: Radio Roma — Esperanto — Via Veneto 56 — ROMA, informante ĉu la voĉoj sonis sufiĉe laŭte, ĉu okazis perturboj aŭ alia malhelpo.

Pro la seriozeco kaj graveco de la eksperimento, oni petas multnombran partoprenon.

Radio Roma donos, dum la dissendoj de Majo la necesajn klarigojn kaj konsilojn por prepari vastan kaj plenan sukceson al la eksperimento.

La dissendo de la 6a de Junio okazos de la 19a h. ĝis la 19a, 20 (itala horo kaj M.E.T.) per la 3 mallongondaj stacioj je 25,21, 31,35, kaj 49,92 m.

A. Blasimme.

La Redaktoro de Scienca Revuo jam nun publike esprimas sian koran dankon al Radio Roma pro ĝia preteco entrepreni ĉi tiun eksperimenton, kies rezultojn ni esperas kiel eble plej baldaŭ publikigi.

Al la legantoj li petas grandnombre partopreni en la eksperimento, kaj zorgi ĉe tio ke la cirkonstancoj estu kiel eble plej konvenaj (ke ne estu bruantaj infanoj en la ĉambro, ktp.). Certe la distingebleco dependas de la karakterizaĵoj de la diversaj sonoj, ankaŭ de la neteco de la prononco de la parolanto, en la kazo de radio kaj telefono krome de distordoj de la sonoj, sed sendube ankaŭ de la kvalitoj de la aŭskultantoj, ekzemple de ilia nacia lingvo, de la korekteco de ilia propra prononco, eble ankaŭ de ilia cetera lingvokono. Por doni ekzemplon: estas konate ke multaj germanoj en sia prononco intermiksas *b* kaj *p*, kaj *d* kaj *t*. En flugfolio de germana urbo publikigita en la pasinta jaro, la tradukinto skribis (dufoje) „*b*ordo" anstataŭ „*p*ordo". La klarigo estas simpla. En sia nacia lingvo li ofte, se ne ĉiam, misprononcas la sonon *p* kiel *b*. Kompreneble li faras tion ankaŭ en Esperanto. Li do diras „bordo" anstataŭ „pordo". Kaj se nun la influo de la aŭdo kaj de la propra misprononco estas pli forta ol tiu de la vido, de la vortbildo, do li skribas„ *b*ordo" anstataŭ „*p*ordo".

Pro tio estas grave scii: la nacian lingvon de la aŭskultinto, la regiono el kiu li devenis (kie li pasigis siajn infanajn kaj lernejajn jarojn), lian ceteran lingvokonon, ĉu li estas sperta aŭ ne tre sperta esperantisto, lian aĝon, ĉu li havas bonan, aŭ ne tro bonan aŭdopovon, ktp.

La provsilaboj estas tute arbitraj, kaj la pli multaj ne havas ian signifon. Mi atentigas pri tio ke la sono *ŭ* povas aperi ne nur *post*, sed ankaŭ *antaŭ ĉiu* el la kvin vokaloj.

Konklude mi instigas vin nepre partopreni en ĉi tiu eksperimento kaj instigi aliajn ankaŭ partopreni. Al ĉiu partopreninto mi sendos la raporton pri la eksperimento.

La Redaktoro.

355.244.1

MILITPROPAGANDO

de d-ro W. WINSEMIUS (Nederlando).[1])

La preparado de aŭ sinpreparo al milito signifas, ke oni havigas al si, krom la necesan materialon, la necesajn homojn kaj la necesan organizon, ankaŭ la laŭeble bonan kunlaboron de ĉiuj kiuj havos aferon kun la atendebla milito, t.e. niatempe praktike la tuta loĝantaro. Por la „ordinara homo" minacanta aŭ efektiva milito signifas militan servon, altajn impostojn kaj aliajn ekonomiajn limigojn, laboregadon sub malfavoraj kondiĉoj, limigojn de la libero ĝis malkašaj devigoj kaj teroro inklude, vivdanĝeron por li kaj la liaj, eblon de detruo de hejmo kaj havaĵo, k.t.p. Ĉion ĉi tion sobre konsiderante, li ne volonte kunlaboros, kaj certe ne libervole. Por akiri la kunlaboron de la publiko, oni do devas influi ĝin, kaj ĉar — laŭsupoze — oni ne povas akiri la plej bonan kunlaboron sen konforma konvinko, ĉi tiu influado devas atingi, prefere, ke la publiko eĉ manifestos ian entuziasmon por la militado. Kelkan kunlaboron oni ja povas akiri per eldevigo kaj teroro; por akiri libervolan kaj entuziasman kunlaboron, tamen, aliaj metodoj de influado estas bezonataj, kaj la komplekson de ĉi tiuj rimedoj oni nomas „propagando", en la kazo konsiderata: „militpropagando". Militpropagandon (sub kiu termino ni komprenas ankaŭ propagandon por militpreparo) niatempe intense faras ĉiu ŝtato sin preparanta por milito aŭ jam militanta.

Tasko kaj celo. — Propagando estas farata ĉefe per la tri precipaj rimedoj de amasa komunikado: gazetaro, radio kaj filmo, krome ankoraŭ laŭ nombro da aliaj, tre diversaj manieroj: paradoj, demonstracio, sportfestoj, ekspozicioj, afiŝoj, kunvenoj, disvastigado de onidiroj, k.t.p. Krom tio, edukado kaj instruado povas esti kvazaŭ trempitaj en propagando; praktike eĉ ne estas eble nete distingi inter propagando unu-, kaj edukado, instruado, informado

[1]) Ĉi tiu artikolo aperis en la nederlanda lingvo en la organo de la Nederlanda Asocio de Sciencistoj *„Wetenschap en Samenleving"* (Scienco kaj Socio), eldonaĵo de van Holkema & Warendorf N.V., Amsterdam, en N-ro 2a de la 6a jarkolekto, Februaro 1952, paĝo 209-214. Ĝin tradukis kun permeso la redaktoro de Scienca Revuo.